

Propono Bagger pri vojaĝ-informa servo  
Claude Gacond, 428-a radioprelego, 1971.12.22 & 25

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Sub la titolo *Vojaĝ-informa Servo kaj turismo* aperis en la revuo *Esperanto* de Universala Esperanto-Asocio artikolo, kiu ŝajnas al ni ege grava. Ĝi alportas proponon, kiu estus sufiĉe facile realigebla. Kaj se tiu propono fariĝus realaĵo, tiam la esperanto-movado farus grandan paŝon antaŭen.

A.- Hodiaŭ ni legos al vi tiun artikolon. Jen kiel sinjoro P. V. Bagger, dana esperantisto, enkondukas sian proponon :

Cl.- *La alloga forto de la pli kaj pli multnombraj internaciaj Esperanto-aranĝoj estas nesufiĉe utiligata pro manko de fidinda, ampleksa, profesi-nivela informado. Forta, centra Vojaĝ-informa Servo povus solvi la problemon.*

A.- Poste sinjoro P. V. Bagger parolas pri personaj spertoj, kiuj tute paralelas la niajn. Jen ni citas lin ree :

Cl.- *Kiel gvidanto de kursoj por gimnazianoj mi plurfoje konstatis, ke nia movado ne posedas multe da allogaĵoj por junuloj. Ne estas prudente menciigi « membrecon », kaj la Delegita Reto, kiu laŭ la Jarlibro estas « unika en la mondo », bedaŭrinde neniel estas unike alloga por la kursanoj. Sed pasintjare SIS*

A.- SIS estas Skandinavia Internacia Somerlernejo

Cl.- *Pasintjare SIS sendis 8000 junulojn al feriokursoj pri la angla, franca kaj germana lingvoj. Tio estas kresko de nulo ĝis ok mil en ses jaroj kaj sekve montras al fekunda kampo. Ankaŭ TEJO*

A.- TEJO estas Tutmonda Esperantista Junulara Organizo

Cl.- *TEJO kaj aliaj aranĝas feriokursojn kaj labortendarojn diversloke, kaj mi decidis prezenti niajn aranĝojn al la kursanoj. Sed tio ne estis simpla afero. Post tralego de pluraj gazetoj mi sukcesis kolekti tre suprajajn informojn pri aro da aranĝoj. Samtempe mi skribis al la diversaj lokoj por havi detalajn programojn. Kelkaj tuj respondis, sed aliaj nur post unu aŭ du monatoj.*

A.- Sinjoro Bagger daŭrigas : *Kaj la programoj, kiuj alvenis, ne estis imponaj. Kelkaj estis malgrandaj slipoj kun nesufiĉaj informoj, ekzemple sen indikoj pri aĝlimo kaj loĝebleco. Tion mi menciis ne por kritiki, sed nur por konstati, ke ofte la aranĝantoj, pro la praktikaj farendaĵoj surlokaj, ne havas sufiĉe da kroma forto por efika internacia informado. Krome ne multaj kursgvidantoj volas fari tiom da skribado por povi prezenti materialon al la kursanoj. Tio estas bedaŭrinda, ĉar malgraŭ la primitiva materialo, malfacile kaj parte malfrue havebla, pluraj junuloj de mia kurso, kaj ankaŭ aliloke en la lando, interesiĝis kaj aliĝis, kaj tio pozitive influis la kurson.*

Cl.- Post tiu objektiva analizo de la realeco sinjoro P. V. Bagger alvenas al sia propono. Jen ĝi :

A.- *Mi juĝas, ke profesinivela Vojaĝ-informa Servo en la daŭro de kelkaj jaroj povus fariĝi kerna elemento en nia internacia vivo. Jen la ĉefaj trajtoj de plen-evoluinta Vojaĝ-informa Servo.*

Cl.- VS

A.- *VS estu fako de la Centra Oficejo de UEA. Tri fojojn jare VS eldonu modernaspektan allogan katalogon de labortendaroj, feriokursoj, festivaloj, kultursemajnoj, skisemajnoj,*

Propono Bagger pri vojaĝ-informa servo  
Claude Gacond, 428-a radioprelego, 1971.12.22 & 25

*kongresoj, kaj tiel plu, sur bona papero, kun koloroj kaj kun bildoj. Aperdatoj povus esti la 1-an de februaro, la 15-an de aprilo kaj la 15-an de oktobro, kun detalaj programoj laŭsezono. La katalogojn oni sendu senpage al individuaj membroj. Landaj Asocioj povus je malalta prezo aĉeti ekzemplerojn por ĉiuj lernantoj kaj kursanoj en la lando. La aranĝoj povus je malaltaj prezoj mendi duonan paĝon, tutan paĝon aŭ du paĝojn da anoncoj en la katalogo. Por ke la informoj estu kiel eble precizaj, fidindaj kaj sufiĉaj, la aranĝantoj devus respondi je tre detala enketilo.*

Cl.- Poste sinjoro P. V. Bagger analizas la sekvojn de tiu propono : *La instruado fariĝus pli vigla kaj interesa, ĉar la kurso povus okupi sin pri aktualaj turismaj tekstoj inter aliaj kun proponoj interesaj por junuloj. La informado fariĝus pli efika kaj natura, ĉar oni povus montri la katalogojn al neesperantistaj amikoj :*

A.- *Ĉu vi ne kunveturos ? Estos kurso por komencantoj tie.*

Cl.- Sinjoro Bagger konstatas : *Eĉ la mizera materialo, kiun mi disdonis, havis tiun efikon – kiom pli, se temus pri alloga katalogo ?*

A.- *En la sekvoj de tiu propono sinjoro Bagger ankoraŭ mencias : Pli fruaj informoj pri multaj aranĝoj, ĉar la aranĝantoj certe – se iel eble – volus reklami jam sufiĉe frue en la katalogo. Pli sukcesaj aranĝoj, ĉar venus pli da partoprenantoj. Pli da aranĝoj, ĉar la aranĝantoj ne plu amator-nivele devus peni informi, sed povus uzi profesinivelan efikan malmultekostan kanalon. Membreco de UEA fariĝus pli alloga.*

Cl.- Sinjoro P. V. Bagger estas realista. Li pripensas la financadon de la proponita servo :

A.- *Ĉar la katalogoj nepre ne estu mizeraj, la eldonado certe ne donus profiton. Se necesus ŝpari el jam ekzistantaj agadoj, mi montrus al la Delegita Reto. Ĝi kostas al ni inter 10'000 kaj 15'000 guldenojn jare, kaj ĝi postulas ne malgrandajn administrajn fortojn. Se rezigno je la unua parto de la jarlibro ĉiun duan jaron povus financi la Vojaĝ-informan Servon, mi pensas, ke tio estus fruktodona interŝanĝo.*

Cl.- Ankaŭ ni opinias tiel.

A.- Vi aŭdis prelegon el Svislando.

Cl.- Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

-oOo-